

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Vi aŭdas prelegaron de Charles Ecabert pri la svisa edukisto Henriko Pestalozzi.

A.- « Superfluginte lastsemajne la junejarojn de Pestalozzi ni trapasos hodiaŭ la duan periodon de lia vivo, tio estas ekde lia edziĝo ĝis la jaro 1780, kiu finigas la unuan sperton pri eduko farita en Neuhof.

Cl.- Kun sia estonta edzino Pestalozzi konatiĝis apud la mortlito de karega amiko : Blüntschild. Anna Schultess devenis el duonpatricia familio, kiu posedis belan riĉan sukeraĵejon en Zürich, sub la ŝildo **Plugilo**. Ŝia patro administris la hospitalon kaj estis ekonomo de la Safran-korporacio.

A.- Ŝi mem estis instruita, klavicenistino, granda, fama pro beleco, ordonpova kaj sentema. Ŝi estre mastrumadis sed samtempe legis Klopstock kaj Rousseau, ĉar ŝi bone scipovis la francan.

Cl.- Ne senbatale Pestalozzi sukcesis ŝin havi de ŝiaj gepatroj malfidemaj rilate junulon, laŭ ilia opinio tro revema. Pestalozzi lernis agrokulturon kaj starigis bieneton nomatan Neuhof, en la valo Birr, kie li kulturis onobrikon kaj rubion.

A.- Tie naskiĝis en 1770 fileto Jakobo. La infano vekis en li nesatigeblan amon kaj difinis lian veran alvokiĝon.

Cl.- « *Mia infano, li skribis, estos iam mia juĝisto. Gardu min, o Dio, enmeti iun ajn malbonon en tiun tute puran animon.* »

A.- Apud la lulilo de sia filo li faris la unuajn spertojn pri edukado. Pli ol ĉiuj aŭtoroj, pli ol Rousseau, pli ol Basedow, pli ol Francke, Jaĉjo estis lia ĉefa majstro. Komence Pestalozzi kredis, ke estus bone gurdi al la etuleto latinajn vortojn, sed baldaŭ li rimarkis sian eraron, kompreninte, ke estus pli bone lasi la infanon mem kontaktiĝi kun la realo, kaj ke la plej bona sinteno estas flanke stari, ne enmiksiĝi.

Cl.- *Se mi devus karakterizi per unu vorto la pedagogion laŭ la spirito de Pestalozzi, mi elektus la vorton : Silentu !* » skribis unu el liaj biografoj.

A.- En 1775 li malfermas laborejon apud sia farmdomo por, laŭ lia deklaro, « *savi el la mizero la malzorgitajn infanojn el la plej humila klaso de la malsupera homaro.* » Li traktis ĉiujn laŭ la apartaj bezonoj, proponante al ĉiu konvenan laboron.

Cl.- En simpla klaskajero li notis pri ĉiu konstantajn rimarkojn. Interalie : « *Anna kaj Elizabet Vogt el Mandach : Tiuj du fratinoj, pro la senhejmeca vivado alkutimiĝis al kompleta senlaboreco. Dum tri jaroj da klopodoj mi kvazaŭ malesperis ilin forpreni el tiuj nenifarado, mensog- kaj ŝtel-emo. Kun profunda ĝojo mi vidas, ke la stulteco de la pli aĝa, pri kiu oni ne povas al si fari ideon, malantaŭen iras iom post iom kaj ŝia malsento maliĝas. Sentoj pri ĝojo, dankemo, ŝuldateco eniras en ŝian koron, kaj signoj de la plej afliktiga senelira malklereco malaperas. En ŝi mi vidis kompletan bildon de knabino kreskinta en sovaĝa stato.* »

A.- Manke de financaj rimedoj la grandanima entrepreno fiaskis. Dudek jarojn poste Pestalozzi notis :

Cl.- « *Mia projekto malsukcesis, sed en tiu grandega klopodo mi lernis grandegajn verojn..., mi lernis koni la mizeron de la popolo kaj ĝiajn fontojn, mi suferis kion suferas la popolo, mia malfeliĉo instruis al mi pli kaj pli multajn verojn por mia celo.* »

A.- Lia edzino rifuĝis ĉe baronino Franciska de Hallwil. Pestalozzi troviĝis sola kun la fileto, sed en la izoleco maturiĝis du ĉefaj verkoj : *Noktlaboroj de solulo* kaj la nekomparebla romano *Leonardo kaj Gertruda*.

Cl.- La unua verko *Noktlaboroj de solulo* estas monologo vespera post batalo kontraŭ la rabado de propra hejmo. Ĝi konsistas el aforismoj, oratoraj pecoj, difinoj, al kiuj oni povas apliki, kion diras la filozofoj James :

A.- « *La ĉefa afero en filozofio ne estas logiko, sed pasia vizio.* »

Cl.- Ideon pri homo Pestalozzi ne bazas, kiel Rousseau, sur duobla postulato, unu metafizika :

A.- *Homo naskiĝas bona,*

Cl.- alia socia :

A.- *lin koruptas socio.*

Cl.- - sed sur antaŭcertaĵo biologia :

A.- ***Vivo enhavas proprajn rimedojn.***

Cl.- Edukado sin apogas sur interna naturo, kiu donas al homo fortojn, kaj sur ekstera mondo, kiu estas lernejo pri realo. Pestalozzi asertas :

A.- « *Levi la nivelon de la internaj fortoj de la homa naturo ĝis la pura saĝeco, tia estas la ĝenerala celo de edukado, eĉ ĉe la plej humila homaro.* »

Cl.- Skribante *Leonardo kaj Gertruda* Pestalozzi intencis fari popolan verkon, publikigi en romana formo **katekismoj pri naturo**, inspiri al la kamparanoj aron da veroj utilaj al ili. La masonisto Leonardo estas bona homo, sed drinkulo. Li ŝuldas tre multe da mono al subvokto Hummel, kanajlego kiu teruras la vilaĝon. La familio malsatas kaj ploras. Leonardo estas savita pro sia edzino Gertruda, kuraĝa virino, kiu iras al vokto Arner por petegi, ke li defendu kaj ŝirmu la mizerulon Leonardo. Arner komisias Leonardon por refari preĝejon. Hummel, sovaĝe kolera, atencas la vivon de Arner, sed malsukcesinte, estas juĝita kaj eksigita. Leonardo elkonstruas la preĝejon, Gertruda ĝuas plej puran hejmfeliĉon.

A.- En la centra figuro de tiu popola epeo honoranta la patrinajn sindonon kaj potencon, oni rekonis miksitajn trajtojn de la patrino mem de Pestalozzi, kaj de la iama sindonema servistino Babeli. »

Cl.- Vi aŭdis prelegon de Charles Ecabert. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-